Baza programo de EDE-federacio

versio de la 10a de marto 2011

Homaj Rajtoj estas la bazo de nia tuta agado, kiel prezentitaj en la Universala Deklaro de Unuiĝintaj Nacioj kaj ni volas atingi la kompletan aplikon de tiu Deklaro en Eŭropo.

I. Eŭropo estas en si mem internacia.

1. - Ni volas tiun fakton konsciigi ĉe Europ-Uniaj civitanoj.

2. - Ni estas por tio, ke la membroŝtatoj aldonu en siaj edukaj programoj eŭropan kaj ekologian perspektivojn. Interalie prezenton de ambaŭ vidpunktoj, kiam temas pri historiaj konfliktoj inter eŭropaj landoj.

3. -Ni volas ke, 10% de armeaj elspezoj en EU estu uzataj por helpo al malriĉaj regionoj en la mondo.

II. Demokratio de unuopaj landoj devas esti pluevoluigata al Internacia Demokratio.

1. -Por solvi tuteuropajn problemojn la referendumoj devas iĝi pli kutimaj. Ni estas por la principoj de civitana iniciato kaj malcentra decidado.

2. -Samtempe devas esti europa leĝo, kiu devigas la amaskomunikilojn restarigi la veron en la samaj proporcioj kiel la erarigaj informoj, kiujn ili dissendis.

3. -Internacia demokrateco bezonas neŭtralan internacian lingvon.

III. Esperanto kaj lingvaj rajtoj

1. -Lingvaj rajtoj devas esti agnoskataj al ĉiuj historiaj malplimultoj kaj al ĉiuj novaj malplimultoj en Eŭropo.

2. -Ni volas, ke la natura kaj kultura ĉirkaŭaĵo estu protektata. Tio inkluzivas la protektadon de la lingva diverseco, simile al la natur-diverseco.

3. -Kiam ne eblas uzi la gepatran lingvon, ni proponas uzi la internacie demokratecan lingvon Esperanto.

Eŭropo Demokratio Esperanto